

# RECIMinfo

Bulteno de *Registrolibro de la Mondcivitanoj*, numero 5, Oktobro 2009, 2 €

## Post deklaro, ek al la konstruado

Ni ĵus solenis laŭlonge de la jaro 2008 la sesdekjariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, sed samtempe ni atingis sesdek jarojn de universala neaplikado de tiuj diritaj rajtoj. Tiu teksto publikiĝis la 10an de decembro 1948 dum la ruinaj areoj postlasitaj de la dua mondmilito ankoraŭ multis, dum la loĝantaroj suferis multajn limigojn, dum ĉiuj timis, ke la Berlina sieĝo aliĝos en novan militon. Preparita dum tri jaroj tiu teksto estas ankoraŭ nun rigardata kiel unu el la plej gravaj tekstoj de la homa historio. Do kial ĝi ne estas aplikita ? Inter la eldireblaj kialoj, ni citu du :

Unue, nur principa estas tiu deklaro, kvazaŭ « kodo de bonkonduco ». La Ĉarto de Unuiĝinta Naciaro, adoptita en 1945, post tre mallonga antaŭparolo, priskribas aŭ antaŭvidas ĉefe la funkciadon de la organizaĵo. En la kunteksto de la Ĉarto, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kompletigas la Ĉarton precizigante la filozofion de la universala civilizo, kiun ĝi proponas. Kaj de tiam, de la 19a de decembro 1948, ĉiu nova ŝtato, kiu petas sian aliĝon al Unuiĝinta Naciaro estas dirita bone konanta tiel la ĉarton al kiu ĝi aliĝas, kiel la Universala Deklaracio, kiu kompletigas tiun lastan. Tamen, deklaro ne estas leĝo.

La dua kialo de la ne-aplikado de Homaj Rajtoj postulas, ke ni konsideru la naturon mem de la organizaĵo de tiuj nacioj, kiuj ne deziras la unuiĝon pri kiu la mondo povus revii. Ne ! la unuiĝo limiĝas je la naturo de ties komponantoj : ĉu tiu ariĝo da ŝtatoj estas alia ol borso por apartaj interesoj ? iu « Wall Street » tinkturita per ĝentileco kaj diplomatio, kiu penas alporti iom da humaneco al la viktimoj de la financa pandemio. Malhelpata agadi pro la ĉarto mem, U.N. povas nur kanti la faman frazon, kiun la D-ro Evatt, prezidinto de la Ĝenerala Asembleo de UN en 1948, verkis kiel rekantaĵo al la alvoko de la civitanoj de la Mondo :

### Enhavo

Eldonartikolo.....	p.1
Rezultatoj de la 11a balotelekto al la Kongreso de la Popoloj .....	p.2
Sesio de KDP en Lieĝo .....	p.3
Sesio de KDP en Braziljo.....	p.4
ASKOP : « Kune agadi - Civitanoj de la Mondo » .....	p.5
Internacia Servas .....	p.5
Sub la signo de unueco	
♦ Tago de Monda Unueco .....	p.6
♦ Arboj de Monda Unueco .....	p.6
Mondcivitanaj teritorioj .....	p.7
Seminarioj de Tutmondismaj Studoj.....	p.7 kaj 8

**9an de decembro 1948** : « UN ne ekzistas por krei pacon, sed por gardi ĝin, kiam la ŝtatoj estos organizintaj ĝin »,

kiun oni povus parodiĝi jene :

**10an de decembro 1948** : « UN ne ekzistas por aplikigi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, sed por rememorigi ĝin, kiam la ŝtatoj estos organizintaj ĝin ».

Tie ĉi la mesaĝo estas klara : se ni ne povas fidi al la ŝtatoj nek al la internaciaj organizaĵoj, nu, ni kuniĝu kun ĉiuj civitanoj, kiuj komencis konstrui la mondon en kiu ni volas vivi.

Daniel

" konstrua kunulo de la monda demokratio "

### Historio de silento

Pasis pli ol du jaroj post la eldonado de la bulteno RECIM-info n-ro 4. Tamen ni (volonta) teamo tute ne feriiis. La 11a balotelekto al la Kongreso de la Popoloj okazis. La Kongreso de la Popoloj dufoje sesiis : en Lieĝo en novembro 2007 kaj en Braziljo en majo 2009. Dum la jaro 2008 okazis multaj aktivecoj, kaj la retejo [www.recim.org](http://www.recim.org) estis refarita kaj pliriĝigita. Tiu papera bulteno cela pli aparte tiujn, kiuj ne havas interretan alireblecon. Mi deziras al vi bonan legadon.

## Dek-unua balotelektado al la Kongreso de la Popoloj

En la estinta bulteno RECIInfo n-ro 4 estis lanĉita alvoko al kandidatiĝo. Sekve de tio, 20 homoj kandidatiĝis por la balotelektado de 15 novaj Deleĝitoj al la Kongreso de la Popoloj. 20 kandidatoj, t.e. la ĝusta nombro, kiu estis esperita. La Balotelekta Kontrolkomisiono ne intervenis por « selekti » la plej valorajn, sed la voĉdonantoj rekte mem elektis siajn deleĝitojn.

La voĉdonantaro konsistis el 5.000 homoj el 110 diversaj landoj. Tamen revenis al ni la balotelektaj dokumentoj de 376 civitanoj ĉefe sekve de adresŝanĝoj (kaj pro kelkaj forpasoj).

### Jen la rezultatoj de la balotelektoj

Voĉdonantaro : 4624 **Balotintoj** : 1317 (t.e. 28,5 %)

Balotiloj nuligitaj aŭ blankaj : 15

**Esprimitaj balotoj** : 1302

**Rezultatoj** :

nombro da havigitaj voĉoj

Chris HAMER .....	1031	elektita
Heloisa PRIMAVERA.....	1010	elektita
Dauji GUPTA.....	982	elektita
Marie-Louise DUBOIN .....	971	elektita
Liliane METZ-KRENCKER.....	913	elektita
Joël LUGUERN .....	904	elektita
Wolfgang FISCHER.....	901	elektita
Leo REBELLO.....	898	elektita
Diomaye SENE.....	896	elektita
Rob WHEELER .....	873	elektita
Ulisses RIEDEL .....	851	elektita
Mustapha NAFATI.....	824	elektita
Bernard CHUZEVILLE.....	802	elektita
Yves ANGELLOZ.....	802	elektita
Vincent PEINGNEZ.....	801	elektita
Karl KPODO.....	784	
Georges FEDERMANN .....	771	
Kenneth KOSTYO .....	765	
Rasmus TENGGERGEN.....	654	
Gerhard HIRSCHMANN.....	574	

La mandato de la 15 elektitoj daŭros 9 jarojn, t.e. ĝis 2016. La memprezentado kaj promesoj de ĉiu el la kandidatoj estas haveblaj el Interreto je la adreso. Laŭ simpla peto, ni povas sendi al vi per poŝto la « kajeron de la kandidatoj ».

Tiuj 15 novaj elektitoj aldoniĝis al la 30 elektitaj Deleĝitoj, kiuj restas el la 10 unuaj balotelektoj.

### Plenuma Komitato kaj Estraro

Dum la Lieĝa sesio (vd. ĉi-poste) la ĉeestantaj Deleĝitoj elektis 9 Deleĝitojn por konsistigi la Plenuman Komitaton. Tiu ĉi konsistas el Peter Davidse, Chris Hamer, Marc Garcet, Ursula Grattapaglia, Liliane Metz-Krencker, Heloisa Primavera, Ulisse Riedel, Rob Wheeler, Roger Winterhalter

Poste la Plenuma Komitato elektis la Estraron, konsistigitan de :

- Ø Prezidantino : Heloisa Primavera
- Ø Vic-prezidantino : Liliane Metz-Krencker
- Ø Sekretario : Marc Garcet
- Ø Deleĝito al la financoj : Peter Davidse
- Ø **Saĝula Konsilio** : Henri Cinaud

**Notindas**, ke la prezidantino Heloisa Primavera rezignis el sia funkcio la 6an de majo 2009. Sub la artikolo 8.4. de la Reglamento, nun plenumas tiun funkcion Liliane Metz-Krencker.

La mandato de la Plenuma Komitato kaj de la Estraro daŭras tri jarojn.

La estonta balotelektado al la Kongreso de la Popoloj : inter la 21a de junio kaj la 21a de septembro 2010.



### Demandoj de legantoj :

Mi ne komprenas kial 1/3 el la kandidatoj estas francaj, pli ol 1/2 eŭropaj kaj estas nur 3 inoj el 20 homoj. Tio estas tre malbona distribuado (...)

*Marie-Thérèse T. (France, 38)*

La freŝdata balotelektado al la Kongreso de la Popoloj donas al mi la okazon rimarkigi, ke en la listo de 20 kandidatoj al sidloko aperas neniu kandidatiĝo : el Ĉinio, el Japanio, el Indonezio, el Turkio, el Pakistano, el Egiptio, el Algerio ... el Rusio, ... el Kanado, dum Francio montriĝis superreprezentita.

Tia malekvilibro, konsiderante samtempe la demografian gravecon de la diritaj landoj kaj la necesan diversecan distribuon de la mondaj respondecoj, devus nepre esti evitata dum estonteco. Mi opinias, ke mia sento povos ricevi konsenton de multaj.

*André F. (France, 57)*

### Respondo : :

Ni plene konsentas pri la observoj esprimitaj de Marie-Thérèse kaj de André. Ni estus ŝatintaj, ke la kandidatiĝoj venu el homoj ekvilibre disloĝantaj tra la planedo, ke estu sameco inter viroj kaj inoj, inter ĉiuj sociaj klasoj, la pensfluoj kaj inter ĉiuj haŭtkoloraj nuancoj. Sed la realeco nestas tia. Per diversaj komunikiloj ni lanĉis alvokon al kandidatiĝoj. Necesis 20 kandidatoj kaj la komisiono ricevis 20 kandidatiĝojn, ne unu plian ! La volo konstrui la mondan demokratio aperas nur en 112 landoj el 192. Tio signifas, ke la geografia disloĝateco de la monda voĉdonantaro estas neniel proporcia kun la disloĝateco de la monda populacio. Tamen la komisiono konstatis, ke la esprimitaj kandidatiĝoj en 2007 relative bone reprezentis la geografian disloĝatecon de la voĉdonantoj al la Kongreso de la Popoloj. Koncerne la diversajn samecojn, la komisiono aplikas la spiriton de la 2a artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, nome ke oni devas praktiki nenium diskriminacion (eĉ se « pozitiva » !) Nur la historio, la kompetenteco kaj la programoj povas esti decidigaj. La kandidatiĝoj estis do tiaj portitaj antaŭ la suverena juĝo de la voĉdonantoj.

*La Balotelekta Kontrolkomisiono.*

### Artikolo 4.6. de la Reglamento de KDP :

La Kontrolkomisiono zorgas aranĝi ekvilibran disecon de la kandidatiĝoj laŭ kriterioj konformaj al la spirito de la 2a artikolo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj.

### Artikolo 2 de la UDHR

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por **ĉiuj homoj**, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

2, 3 kaj 4-an de novembro 2007 :

## Sesio en Lieĝo

Fine, la Kongreso de la Popoloj trovis realan ekziston, kvankam la institucio devas vagadi ankoraŭ por regajni la videblecon perditan de antaŭ jaroj kaj la gravecon kiun ĉiu atendas de ĝi.

La vespere vendreda renkontiĝo disvolviĝis en la junulargastejo de lieĝo, ĉefe por koni nin, unue dum la vespermanĝo, poste en la vesperkunveno: ni estis 14 elektitaj delegitoj de la Kongreso de la Popoloj kaj 25 nome de la Konsultiĝa Asembleo.

La sabata kaj dimanĉa kunvenoj okazis en la "Motorium de Herstal" (malnova fabriko), loko administrata de la Interregiona Asocio de Sano kaj terapia Gvidado kiu akceptis ĉi tiun sesion.

Roger Winterhalter, la ekŝiĝinta Prezidanto bonvenigis la partoprenantojn reliefigante nian utopion: ni devas inventi la mondon de la estonteco, tio estas "scii kiel kunvivi", ni devas paroli pri ĝi sed ni precipe devas fari el ĝi realon.

Marc Garcet kaj Henri Cainaud, la plej maljunaj el la elektitaj delegitoj, volis fari omaĝon al Guy kaj Renée Marchand. Sen ili, la grandega espero naskiĝinta de la stariĝo de la mondcivitaneco en 1948 estus malaperinta kaj la tuta laboro de la rezistuloj kaj de la pioniroj estus perdita. Marc Insistis pri la filozofiaj kaj humanismaj valoroj kiuj estis tenitaj de malsamaj komisionoj en la 60-aj kaj 70-aj jaroj, kiuj rezultis en dudeko da libroj, kaj kiuj pravigis la kreon de la Institucio de Tutmondismaj Studoj, kies prezidento li estas. Poste Henri reiris pli for en la tempo, por rememori ke la ideo de la demokratia tutmondismo estis jam subtenita, en la 20-aj jaroj de movado gvidita de la usonanino Lola M. Lloyd kaj la hungarino Rosika Shwimmer. Pasis jam 80 jaroj kaj la faktoj montras ĉiutage ke la mondo ankoraŭ ne trovis la regulojn de ties propra ekzisto.

Tuj poste, la Asembleo dividĝis je pluraj laborgrupoj: "Vivi kune", "Labori kune", "Solidareca Ekonomio" "Materialaj kaj Financaj rimedoj".

### La rezultatoj de la Sesio

- ◆ La laborgrupoj "Vivi kune" kaj "Labori kune" kununiĝis por krei formon de movado "Labori kune, Mondcivitanoj" kadre de la Konsultiĝa Asembleo, kiel forto de proponoj por la Kongreso de la Popoloj. (Vidi paĝon 5).
- ◆ Solidareca Ekonomio estos la ĉeftemo de la venonta sesio en Braziljo (Vidi paĝon 4).
- ◆ ASKOP prezentis al la Kongreso de la Popoloj peticion subskribitan de 145 personoj el 16 landoj. Per ĉi tiu peticio la subskribintoj petis al la Kongreso de la Popoloj proklami la ĉiujaran martan ekvinoksan tagon "Tago de la Mondcivitanoj, Tago de Monda Unueco", simbolo de labortago kontraŭ la malegalecoj, la maljustecoj, la rasismo kaj la ekskluzivado. Ĉi tiu propono estis unuanime adoptita de la Kongreso de la Popoloj, krom du sindetenoj. (Vidi paĝon 5).
- ◆ Ankaŭ estis prenitaj aliaj decidoj koncernantaj la internan funkciadon.

La **Kongreso de la Popoloj** ekzistas kiel konstru-elemento de la **tutmonda demokratio**. La patreco de ĉi tiu institucio estas atribuebla al la nederlandana ĵurnalisto: Alfred Rodriguès Brent, kiu sukcesis konvinki la ĉefajn tutmondismajn organizaĵojn de la 50-aj kaj 60-aj jaroj iniciati procezon kapablan iom post iom stariĝi rilate al UN aŭ eĉ transpreni ties torĉon. (Vidi 4-an RECIM-infon).

Balotelektoj okazis ekde 1969. Tiuj transnaciaj balotelektoj koncernis, el 114 landoj, iom pli ol 100.000 personojn enregistritajn en tutmonda listo de voĉdonantoj. Post la 10a balotelekto, en 1998, la Kongreso de la Popoloj stariĝis kontraŭ malfacilaĵoj, pro kiuj ĝi devis modifi la balotektan reglamenton laŭ kunvenoj okazintaj de 2003 ĝis 2006. Poste la jaro 2007 estis tiu de la renovigo de la institucio : 15 novaj delegitoj estis elektitaj kaj la renovigita Kongreso de la Popoloj kunvenis sesie du foje:

- Ø en Lieĝo (Belgio) la 2an, 3an kaj 4an de novembro de 2007
- Ø kaj en Braziljo (Brazilo) de la 11-a ĝis la 15-a de majo de 2009.

### La Estraro elektita en Lieĝo



De maldekstre dekstren : **Liliane Metz-Krencker** (Francio) vicprezidantino, **Heloisa Primavera** (Argentinio) Prezidantino, kaj **Marc Garcet** (Belgio) ĝenerala Sekretario. Ĉe alia table sidas la kasisto **Peter Davidse** (Nederlando).



Plantado de la Arbo de Monda Unuiĝo apud la turo de Eben =Ezer, grava loko de la tutmondismo en lieĝa teritorio : la aceridon tenas la ekŝiĝonta prezidanto Roger Winterhalter dum ĉiu partoprenanto alportis iom da tero. Tie ĉi Thonton Kabeya Kabamba, konga artisto el Lubumbashi.

De la 11a ĝis la 16a de majo de 2009 :

## Sesio en Braziljo.

Antaŭvidita de la sesio de Lieĝa (novembro 2007) ĉi tiu sesio en Braziljo riskis, unuflanke, pro iuj malfacilaĵoj en la organizado de la komence antaŭvidita programo, kaj aliflanke pro la anoncita pandemio de gripo A H1N1. Ĉi tiu necerteco kaj la malfacilaĵoj montriĝis tiel premaj ke la Sinjorino Heloïsa Primavera juĝis oportune meti finon al sia mandato kiel prezidento de la Kongreso de la Popoloj. Sed la aliĝintaj partoprenantoj rezistis kaj ili venis, tiel ke la antaŭvidita sesio povis okazi labor-taŭge sed kun tagordo reordigita.

### Du kunvenoj en unu !

Kiel estis ĉiam, la kunvenoj de la Kongreso de la Popoloj kunvenigas ne nur la elektitajn Deleĝitojn, sed same la mondcivitanojn kaj la reprezentantojn de organizaĵoj. La elektitaj Deleĝitoj al la Kongreso de la Popoloj formas ian parlamentan asembleon, dum, de 2004, la mondcivitanoj kaj la organizaĵoj, vera tutmondista civila socio, kunvenas en la Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj (ASKOP) en kiu membras proksimume 80 organizaĵoj el 23 landoj.

### Gravaj laboroj

La Sesio okazis de la 11a ĝis 15a de majo precipe en komunaj kunvenoj, kun tamen du okazoj en kiuj la Kongreso de la Popoloj kaj ASKOP kunvenis aparte. La prenitaj decidoj en Braziljo malfermas gravajn laborojn pri kiuj ĉiuj kiuj sentas sin mondcivitanoj kaj ĉiuj organizaĵoj volantaj povos okupiĝi

► Grupo el kvar aferoj implicis la Homajn Rajtojn. Responde, la brazilja sesio decidis krei institucion kunigantan ĉiujn personojn aŭ asociojn kun la celo krei Mondan Institucion de la Homaj Rajtoj. Ĉi tiu institucio konsistis el jura kaj socia membraro kiu devenus de la NRO-oj aŭ ĉiu persono kiu sekvus la samajn direktojn por la defendo kaj la promocio de la Homaj Rajtoj. Ĉi-cele, estas antaŭvidite la realigo kiel eble plej frue de ĉarto de la Homaj Rajtoj kiu permesu difini la terminojn kaj la konkretajn agadojn por la defendo de la Homaj Rajtoj. La fina teksto devos tuj utili al la Defendantoj de la Homaj Rajtoj, kiel kontraŭpovo. La asocio "Agadi por Homaj Rajtoj" estis komisiita por prizorgi la preparajn laborojn. Ni jam antaŭvidas ĉi-cele la okazigon de "Seminario de Tutmondismaj Studoj" en Chelles majo 2010. Monda Solidareco kontraŭ la Malsato povos partopreni.

► Alia grupo da aferoj koncernis la interrilatojn kun UN. La Kongreso de la Popoloj deziras akiri statuson en UN. Samtempe, ĝi donas sian konsenton al la kampanjo favora al la rajto de la monda popolo je rekta reprezentado en la sino de UN. Ĉi tiuj du grupoj da decidoj karakterizas la ekvilibran rigardon de la estonteco de la mondaj kaj internaciaj institucioj. Neniu konas la estontecon, kaj se la tutmondismaj elpaŝoj influitaj de la kreintoj de la Kongreso de la Popoloj al ni ŝajnas la plej pravaj, tamen ni ne povas ignori la ekziston kaj la reviziokapablon de la internaciaj institucioj. La venonta sesio de la Kongreso de la Popoloj okazos en Zagora (Maroko) komence de novembro de 2010, nur kelkajn semajnojn post la 12a balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj kies elnombro de balotiloj estas antaŭvidita por septembro de 2010.

*Daniel Durand*

### AMAZONIO ĈIAM

Kelaj mondcivitanoj estis invitatitaj partopreni en monda subskribo-kolekta kampanjo por la gardado de la Amazonio. Ĉi tiu kampanjo jam kolektis pli ol 1.500.000 subskribojn kaj estigis specialan sesion de la federala Senato de Brazilo, merkrede 13an de majo. La ĉeestantaj membroj de ASCOP kaj de la Kongreso de la Popoloj iris al la Senato por ĉeesti la debatojn. La debatoj kompreneble okazis en la portugala, sed dank' al la servoj de kelkaj esperantistoj, ĉiuj ili povis sekvi la protokolon kaj la pritraktitajn temojn. Estis tre aparta intereso pri nia ĉeesto en la Senato: fakte Muriel Saragoussi devis esprimi sin tie je la nomo de kolektivo el 600 organizaĵoj aŭtoktonaj de la Amazonio. Muriel estas elektita deleĝito al la Kongreso de la Popoloj. Laŭ Ursula Grattapaglia kiu sekvis tre atente ŝian paroladon, la deklaroj de Muriel estis bonegaj ĉu rilate la kaŭzojn de la loĝantaroj kiujn ŝi reprezentis ĉu rilate la vidpunkton de la monda demokratio kiu naskiĝas.

Notindas ankaŭ, la parolado de 12jaraĝa knabino kiu esprimis sin antaŭ la Senato kiel proparolanto de la gejunuloj de ŝia generacio por ke la aktualaj responsuloj lasu al ili teron kie la vivo estu ebla.

*DD*



En Braziljo "Paraiso na Terra" la konstruaĵo, kie okazis la sesio de Kongreso de la Popoloj



Landing Niassy (Senegalia) kune kun Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia (Brazilo)



Intervjuo de Peter Davidse far Ulisses Riedel en la elsendejo de TV-Supren. Tradukado de Ana-Maria de Mesquita.



### Kune agadi - civitanoj de la Mondo

Dum la konsistigo de la interna ASKOP-komisiono " Kune Agadi " starigita en Lieĝo, margene de la sesio de Kongreso de la Popoloj, ni elektis labori pri la LIGILOJ por progresigi nian tutmondistan pensfluan, por iam vidi Instituciojn kaj Mondan Parlamenton demokratiajn reprezentajn de ĉiuj loĝantaroj de la planedo. Ni celas konvinki ĉiun pri nova imago. Progresigi niajn ideojn estas konvinki, krei rilatojn kun la loĝantaroj, kiuj vivas proksime de ni.

Civitaneco, civitismo, monda solidareco havas signifon nur se tio kondukas al lokaj civitanaj iniciatoj, kiuj donas realecon al niaj ideoj. Ja sur la ĉiutaga kampo ni devas fundamenti nian laboron pri " **Kune agadi** ", progresigi niajn ideojn en la mensoj por vidi ilin konkretigitaj en la balotujoj !

Jen kial ni devas rapide provizi nin per laborinstrumento : reto da ligiloj, kiuj transformiĝas kiel aranea reto por interligi nin kaj esti rapide informitaj por :

#### Agadi

Ni kune klopodos starigi kun via helpo reton " **Kune agadi** ". En ĝi vi trovos la rimedojn por vin kaj nin informi, ellabori proponojn kaj kune labori kaj agadi.

#### Ekkoni

Interkonatiĝi, federi la " bonajn " ideojn, la bonajn demandojn, kaj la bonajn respondojn, la vidpunktojn kaj deklarojn pri la evoluo de la socio.

Nombri kaj federi la personojn, la organizojn kaj asociojn, kiuj havas originajn aŭ novigajn vidojn, ideojn aŭ projektojn por plibone kune vivi en plurkultura socio. Ekkoni kaj diskonigi la tuton de la multkulturaj aŭ tutmondistaj manifestacioj kaj agadoj.

#### Interŝanĝi

Doni la parolon al ĉiuj, kiuj surloke aŭ ĉiutage agadas. Surloke ja ni devas fundamenti la novan civitanekon, progresigante niajn ideojn en la mensoj. Tie estas la unuaj padoj por kune agadi. Ni ilin utiligu, diskonigu, plibonigu. Ni deziras kiel eble plej asocii vin en nia klopodado. Ni deziras vidi vin multope partopreni, animi, proponi ideojn. Jen kial ni devas " kune agadi " la ligilon. Ni ne havas fuŝotan tempon

? **La reto « Kune agadi – Civitanoj de la Mondo » povas stariĝi ĉie ajn.**

? Tiuj kiuj povas aliri al Interreto estas invititaj tralegi la paĝojn [www.recim.org/ascop/rezo1-eo.htm](http://www.recim.org/ascop/rezo1-eo.htm) . La reto konsiderinde disvolviĝis en Facebook, ĝis enteni pli ol 3000 homojn dividitajn en deko da grupoj.

ASCOP, ĉe Alain BAL, 16 rue de Belleneuve, 21 270 BINGES (Francio)

## ASKOP

ASKOP naskiĝis en 2003 el la volo de la Kongreso de la Popoloj kunigi sub saman tegmenton ĉiujn organizaĵojn, kiuj estas ligitaj al ĝi pro la fondiĝi, la balotelektado aŭ la simpla subteno. ASKOP akiris sian maturiĝon okaze de la Brazilja sesio. Tiam fakte tiu organizo el la tutmondista civila socio transdonis al la elektitoj al la Kongreso de la Popoloj ĉiujn atendojn de la asocioj kaj de simplaj civitanoj. Responde ASKOP vidis al si konfidita de la Kongreso de la Popoloj la zorgo daŭrigi la pripenson kaj la laboron cele al la fondado de Monda Institucio de Hormaj Rajtoj. Grandega tasko.

Nun ASKOP kunigas ĉirkaŭ 80 organizaĵoj el **23 landoj**, sed el kiuj pluraj estas **sennaciaj** organizaĵoj. ASKOP mem estas **registrata en la Jura Servo** de la Kongreso de la Popoloj kiel organizaĵo sub monda juro.

Se vi deziras plifortigi la agadkapablon de ASKOP, la aliĝoj, kotizoj kaj donacoj povas esti senditaj al ASKOP (adreso ĉi sube)



Paĝoj [www.recim.org](http://www.recim.org). Alklaku sur « français » kaj sur tiun bildon. Tiamaniere vi libere aliros al la franclingvajn paĝojn de ASKOP en Facebook.



« Belgica », Brusela metrostaciejo, kie grupo « **Kune agadi** » el 500 homoj realigis vastegajn freskojn pri la klimata plivarmiĝo.



### SERVAS International

En 1948 Bob Luitweiler ekhavis la ideon fondi la reton « **SERVAS** » por favorigi la renkontojn inter individuoj kaj familioj el ĉiuj landoj de la mondo. Tiu asocio havas kiel ĉefan celon labori por pli da paco kaj teloremo, renkontigi individue personojn el ĉiuj landoj kaj el ĉiuj kulturoj sen distingo de devenoj aŭ de lingvoj. **SERVAS** kontribuas antaŭenpuŝi la interkompreniĝon inter popoloj kaj tiamaniere partoprenas en pacigo. De 50 jaroj la frukto de tiuj renkontoj inter homoj el diversaj landaj kaj kulturoj, la ekkono de la Alia, interŝanĝo, amikeco, favorigas la toleremon inter la popoloj.

Kiel internacia asocio, **SERVAS** havas observan statuson ĉe Unuiĝinta Naciaro kun la NRO. **SERVAS** arigas ĉirkaŭ 15.000

aliĝintoj tra la mondo en 120 landoj. Gastigantoj kaj vojaĝantoj sin devontigas dediĉi tempon por interŝanĝo kaj renkonto kun la Aliulo, en plena senpageco por minimuma dutaga daŭro. La gastiganto malfermas sian domon kaj donas tempon al la vojaĝanto por igi lin malkovri lian vivmanieron kaj lian kulturon. Gravas la kvalito de la akcepto, de la interŝanĝo kaj de la renkonto.

**SERVAS** volas gardi sian liberecon por konservi siajn valorojn de toleremo kaj de malfermeco per la renkontoj inter individuoj.

Aliĝi al **SERVAS** signifas, ke oni akceptas ties etikon, ties funkciamanieron kaj ties principojn surbaze de toleremo, kiuj faciligas la renkontojn kaj pretigas pacon.

[www.servas.org](http://www.servas.org)



# Sub la signo de unueco



## 20an de marto 2010 Tago de la Mondcivitanoj - Tago de Monda Unueco

Dufoje jare la trajektorio de la tero estigas, ke la suno troviĝas perpendikle al ekvatoro. En tiuj tagoj, dum en polusoj la suno montriĝas duoncirkle ce horizonto, ĉie alie lumo kaj mallumo estas perfekte samlongaj : 12 taglumaj horoj kaj 12 noktaj horoj. Ili estas printempa kaj aŭtuna ekvinoksoj. Kial ne projekcii tiun kosman egalecon sur nian civitanan vivon ? Egaleco inter homoj laŭ rajtoj kaj respondecoj, egaleco inter ĉiuj homoj malgraŭ la malsamecoj, egaleco antaŭ la leĝoj... Plurfoje en la freŝa historio kelkaj mond-civitanoj proponis, ke unu aŭ alia el tiuj datoj, aŭ ambaŭ, estus solenitaj kiel tago de la civitanoj de la Mondo, tago de monda unueco, tago de agado kontraŭ la malegalajtoj, kontraŭ maljusto, kontraŭ rasismo kaj kontraŭ ekskludo, tago dum kiu ĉiuj terloĝantoj estus invitataj pripensi pri la estonteco de la homaro kaj de la planedo.

La 4an de novembro 2007, la Kongreso de la Popoloj voĉdonis por la oficialigo de la marta ekvinokso kiel "**Tago de la Civitanoj de la Mondo, Tago Monda Unueco**".

### Sugestoj por la Tago de Monda Unueco

#### Persona strebado

- Preni tempon por legi la informojn de la civitanoj de la mondo kaj de tiuj, kiuj referencas al tiu intelekta aŭ politika klopodo.
- Interesiĝi pri la konkretaj agadoj inspiritaj de la monda civitaneco.
- Pagi memvolan financon kontribuon por la antaŭenpuŝo de la monda civitaneco.

#### Rilata strebado

- Subskribi ĉiun el siaj retmesaĝoj per " n, civitano de la mondo "
- Indiki sub sia subskribo en ĉiu el siaj restmesaĝoj sian preferatan paĝon de mond-civitana retejo ([www.recim.org](http://www.recim.org) aŭ alia)
- Saluti siajn najbarojn, amikojn aŭ kunlaborantojn per kelkaj vortoj en lingvo alia ol la uzata lingvo, kial ne en Esperanto
- Inviti almenaŭ unu homon sin deklari civitano de la mondo ; doni al li aŭ ŝi registriĝan dokumneton.

#### Aktivula strebado

- La infanoj estus invitataj imagi dokumentojn, kiujn ili povus doni dum la Tago de Monda Unueco : desegnitajn legitimkarton, pasporton aŭ ian karton, kiuj permesu iri ĉien tra la tero.. . imagi nomojn miksante la devenojn , ...
- Fari homan ĉenon, kiu transpasas la landlimojn
- Krei mond-civitanajn vojojn
- Konsistiĝi Babel-turon el bildoj kaj pentraĵoj pri la temo "Kune vivi"

#### Komuna strebado

- Organizi feston aŭ partopreni en ĝi
- Planti "arbon de monda unueco" en publika loko, kun la permeso kaj la partopreno de lokaj aŭtoritatoj
- Aranĝi video-projekciadon aŭ vesperan kunvenon kun kunigema temo
- Fari biciklan rondiron de la situoj pri paco, kie oni transdonus torĉon, ekzemple : Eben-Ezer, Verdun, Lutterbach, Strasburgo. Similaj aferoj povus okazi en Afriko aŭ ie ajn.

**Antaŭdankon se vi komunikos al ni viajn ideojn kaj iniciatojn**

### Kiuj estas niaj simboloj ?

La simboloj estas nepre necesaj al la spirito por esprimi samtempe identecon, apartenon, memdevontigon aŭ volon.

La datrevenoj, la jubileoj, la kotonaj aŭ oraj nuptofestoj, la flora lingvo, la markoj, la desegnoj, la emblemoj, la standardoj, la himnoj, la uniformoj, la monumentoj, la vortoj, la paraboloj, la ceremonioj, la manpremoj ... ĉio estas simbolo. Kaj per la utiligo de tiu aŭ tiu ĉi simbolo en tia aŭ tia ĉi cirkonstanco mesaĝo povas transpasi.

La Civitanoj de la Mondo, kiuj ni estas, devas ankaŭ utiligi sufiĉe diversajn simbolojn por diskonigi nian mesaĝon kaj enkulturi nian komunumon de vivo kaj de sorto ĉirkaŭ komunaj valoroj : frateco, solidareco, respekto de homo, demokratio, respekto de la vi respekto de la planedo, transpaso de la limoj, tutmonda analizo, libereco, ĉies plenhomeco, ktp..

Por porti tiujn valorojn kaj diskonigi nian mesaĝon, ni havas kelkajn simbolojn :

- ♦ la nomo « civitano de la mondo »
- ♦ emblemato
- ♦ legitimkarto



#### Jen du pliaj simboloj :

- ♦ **la Tago de la Civitanoj de la Mondo, tago de Monda Unueco**
- ♦ **la arboj de Monda Unueco.**

Tiuj simboloj estas tiuj de la monda civitaneco kaj ne ekskludas la aliajn simbolojn portatajn en la sama senco, tiaj kiaj la tago de la tero, la tago de la paco, la tago kontraŭ la rasismo, ktp.

Ili ankaŭ ne ekskludas aliajn simbolojn kapablajn kunigi nin al la unueco al kiu ĉiuj ni sopiras ĉu himno ? standardo ? komuna lingvo ? Apartenas al la Civitanoj de la Mondo gravuri sian historion.



#### Arboj de Monda Unueco plantitaj :

- ♦ en **KOHE**, (Togolando) la 22an de julio 2007
- ♦ en **AKRO** (Ganao), la 8an de novembro 2008
- ♦ en **BRAZILJO** (Brazilo) « boskon » da 20 arbidoj, la 16an de majo 2009



**Historie, la unuaj** tutmondiĝoj datumas de la sama epoko (1949) kiel la fondado de Mondcivitana Registrolibro kaj rilatas al la sama klopodado : la enregistriĝo, kiel Civitano de la Mondo estas individua klopodo, dum la tutmondiĝoj de urboj kaj komunumoj estas kolektivaj klopodoj. Forgesitaj dum kelkaj tempoj, la tutmondiĝoj rekomenciĝis kun decidemo en la komenco de la 1970-aj jaroj, kaj komisiono de tutmondiĝoj ekzistis de tiam ĝis nun, ligita al la aktiveco de Roger kaj Renée Volpellière, Henri Cainaud, Georges Mary, Guy kaj Renée Marchand kaj aliaj. De pli ol 10 jaroj, Roger Winterhalter animis tiun komisionon kun tute rimarkindaj sukcesoj : Lutterbach, St-Nolff, Chelles, Lehaucourt, Grambois (Francio), Boulock (Gambio) Gjilan (Kosovo) Dario (Nikaragvo), Kalonge, Kashusha, Mbanza Ngungu, Muchingiko, Chegera (Kongio), Kohé (Togolando, Stabroek (Belgio), ktp.

Laŭ propono de la Estraro de Registrolibro, farita la 29an de aprilo 2008 kaj prikonsentita de la komisiono la 28an de oktobro 2008, tiu ĉi fariĝis agada fako de Registrolibro. Sed necesis ankoraŭ plu reorganizi pro la revizio de la Reglamento de la Kongreso de la Popoloj. Dum la Komisiono de Tutmondiĝoj konsistis nur el interesiĝantaj Civitanoj de la Mondo, **la nova teksto stipulas, ke la geografiaj komunumoj alvokitaj por voĉdonadi al la Kongreso de la Popoloj estu efektive reprezentataj per delegacio sine de la laborgrupoj.**

Tial per du stadioj : Balotado de la Administra Konsilantaro de Mondcivitana Registrolibro, la 12an de decembro 2008, kaj kunveno kiu okazis en Creteil (Francio) la 28an de marto 2009 la malnova komisiono de la Tutmondiĝoj fariĝis la « Konsilio de Mondcivitanaj Teritorioj ». La protokolo de tiu kunveno kaj la historio estas haveblaj laŭ simpla peto je la adreso de la bulteno.

Tiu reformo estas grava, ĉar ĝi implicas, ke ĉiu « teritorio », kiu deziras sin deklari « mond-civitana » nomu iun personon aŭ komitaton, kiu estos la kontaktulo de la « **Konsilio de Mondcivitanaj Teritorioj** », sed ankaŭ ke estu antaŭvidita delegito por reprezenti tiun teritorion sine de la Konsilio. Tiu reformo koncernas kompreneble la novajn teritoriojn, sed ankaŭ la malnovajn « tutmondiĝintajn komunumojn » al kiuj taŭgas klarigi la klopodadon.

Al kio tio povos utili ? Vidu ĉiujn sugestojn, kiuj estas tie ĉi faritaj. La eduka aspekto kaj la konsciigo de la loĝantoj de tiuj teritorioj estas interesoplenaj. Tial du demandoj povas stariĝi :

- ? Si vi loĝas en iu el la 974 mond-civitanaj teritorioj, kial ne konigi vin en tiu ?
- ? Si via komunumo, via laborejo aŭ via lernejo ankoraŭ ne faris tiun klopodon, ĉu vi estu preta lanĉi vin en la aventuro ?

<http://www.recim.org/dem/conseil-eo.htm>

## Seminarioj de Tutmondismaj Studoj

### Akro (Ganao), la 7an ĝis 9a de novembro 2008

Kelkaj Civitanoj de la Mondo el Ganao, Togolando, Eburio kaj Francio kunvenis en Lartebikorshie, komunumo ĉe Akro, Ganao, por daŭrigi la pripenson iniciatitan dum la seminario de Bohicon, en 2006. Unu el la prelegoj temis pri demokratio en Afriko. La ideo de la preleganto kaj organizanto Karl Kpodo estis, ke la demokratio estas kiel tuto. Ĉu oni povas starigi mondan demokration dum la demokratia kulturo ne estas sufiĉa je loka nivelo ? El tio fluas la ideo pri Afrika konsilio de la Demokratio. Ni reparolos pri tiu propono. Alia temo koncernis la civitanan iniciaton kaj pli aparte pri la protektado de la medio. El tio la ideo konsistis « Komitatoj el loka iniciato por



plibonigi la medion » (francilingva mallongigo : CILAME !!)

### Zagora (Maroko), la 26an ĝis, 28a de februaro 2009

Tiu sama temo de la civitana iniciato estis esplorita de ĉirkaŭ sesdek personoj el Francio kaj Maroko, kiuj kunvenis en Zagora : « De la loka civitaneco ĝis la monda civitaneco » Tiu seminario rekomendis precipe la enretigo por plifortigi ĉies agadkapablon.

La protokoloj estas haveblaj el Interreto [www.recim.org/dem/arkiv-fr.htm](http://www.recim.org/dem/arkiv-fr.htm). (francilingva). Vi povas ankaŭ peti ilin al la adreso de la bulteno.

- ♦ Disdonado al la loĝantaro de informoj pri la celoj kaj la rimedoj de tutmondismo kaj de Kongreso de la Popoloj.
- ♦ Invitado al la municipoj kaj loĝantaroj por partopreni en la balotelektoj kaj subteni la elektitajn delegitojn al la Kongreso de la Popoloj.
- ♦ Konsciigo de la loĝantaroj kaj pli aparte de la lernantoj pri la tutmondeco de la grandaj problemoj (poluado, malsato, demografio, armiloj...) (Disvolvado de la ideo de tutmonda civitismo).
- ♦ Solenado de la Tago de Monda Unueco dum la marta ekvinox-tago. Animi la tagon per temo de monda intereso.
- ♦ Informado al aliaj urboj aŭ komunumoj pri la celoj kaj la agado de Kongreso de la Popoloj.
- ♦ interŝanĝoj inter loĝantaroj de mond-civitanaj komunumoj. Ĝemeligo inter samnivela Mondcivitanaj Teritorioj.
- ♦ Aranĝi tiun klopodadon por la monda demokratio kun tiu de la kurantaj ĝemeligoj kaj kun la similaj organizaĵoj : « Urbestroj por la Paco », « Unuiĝintaj Civitoj », « Ĝemelaj Urboj », ktp..
- ♦ Aranĝi turismajn vojaĝojn.
- ♦ Regula subvencio konsentita de la Mondcivitanaj Teritorioj al la Kongreso de la Popoloj.
- ♦ Materialigo de la tutmondiĝo : arbo de Monda Unueco, monumento, ŝtonoj je la enirejoj de la urbo, tutmondiĝa ĉarto aŭfiŝita en la urbodomoj.
- ♦ Malfermo de tutmondisma fako en la urbaj bibliotekoj.
- ♦ Partopreno en la eldonado de la bulteno RECIM-mondo aŭ alia samcela bulteno.
- ♦ Partopreno en la Konsilio de la Mondcivitanaj Teritorioj
- ♦ Kunlaborado kun tutmondismaj organizaĵoj, interalie kun tiuj, kiuj membras en ASKOP.
- ♦ Fondado de Domo de Monda Civitaneco.
- ♦ Aliĝado al Monda Solidareco kontraŭ la Malsato.

♦ ktp ... laŭ la imagpovo.



22an de julio 2007 : la vilaĝestro de Kohé (Togolando) ricevas la ateston pri la tutmondiĝo de

**Por ricevi vian Mondcivitanan legitimkarton kaj fariĝi balotanto al la Kongreso de la Popoloj**, sendu la ĉi-suban formulon, plenigitan kaj subskribitan **kun la monsumo 15 €** (aŭ 8 € okaze de malfacilaĵo) al la adreso en St-Aubin de Luigné,

*"Konscia pri miaj respondecoj kaj decidinte akiri la rekonon de miaj rajtoj kiel membro de la tutmonda komunumo, mi petas, plu gardante mian ŝtatanecon, esti registrita kiel **mondcivilano**".*

NOMO (per majusklaĵaj preslitteroj) ..... FRAŬLINA NOMO .....

PERSONAJ NOMOJ .....

Naskiĝdato ..... Naskiĝloko .....

Loĝeja adreso .....

Poŝta adreso (kesto) .....

Poŝta kodo ..... URBO, ..... Lando : .....

la .....  
(dato kaj subskribo)

Laŭeble sendu vian **foton por legitimilo**

## Seminarioj de Tutmondismaj Studoj

Du seminarioj estas nun preparataj

- **Vagaduguo** (Burkinio) de la 14a ĝis la 19a de decembro 2009
- **Chelles** (Francio) la 14an kaj 15an de majo 2010. (Ni parolos pri tiu ĉi en la venonta numero de RECIM-info.)

### **VAGADUGUO, de la 14a ĝis la 19a de decembro 2009**

Ĉe Hotelo BANGRIN, en Vagaduguo, Burkinio

**CAFES** (Centro de Helpe, Klerigado, Dungado kaj Staĝo)

**organizas** kunlabore kun Registrolibro de la Civitanoj de la Mondo (RCM), la Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj (ASKOP) kaj la Ministerio por la antaŭenpuŝo de la Homaj Rajtoj en Burkinio,

**klerigan seminarion** pri la jena temo :

« **solidareco, paco, drogo kaj daŭra disvolviĝo, kion fari ?** »

- lukto kontraŭ la drogo kaj narkotaĵoj en Afriko
- la eksperimento de la Gvineo – Conakry
- la eksperimento de Burkinio
- monda demokratio kiel kondiĉo de ebla estonteco
- parceligo de la tero, justice ka monda demokratio
- civitaneco kaj paco
- daŭra disvolviĝo
- Afrika unuiĝo kiel kondiĉo de solidareco kaj de evoluigo en Afriko
- internacia solidareco kaj helpado

**kun la prezentado de**

- Registrolibro de la Mondcivitanoj
- Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj **ASKOP**
- Monda Solidareco kontraŭ la Malsato
- La kuranta klopodado al civitana Monda Institucio de Homaj Rajtoj
- Esperanto, ilo interesoplena por justa kaj daŭra evoluigo

Aliĝa kotizo : 150 000 CFA F por persono (luado de prelegejo, kostoj de prelegantoj, diplomo, kafa paŭzo, ktp.).

Ekskursaj kostoj kaj vizito de organizaĵo : 25.000 CFA F por persono (turisma vizito, malstreĉiga aŭ kultura promenado) la salajraj kompensoj, asekuroj, loĝado, veturado kaj transportaj kostoj estas pagataj de ĉiu partoprenanto.

Aliĝo rekte ĉe **CAFES**

01 BP 6368, OUAGADOUGOU 01 Burkina Faso  
Tel (226) 50 45 83 85. Fax (226) 50 33 33 62  
[cafes2005@yahoo.fr](mailto:cafes2005@yahoo.fr)

## ALVOKO POR KONTRIBUOJ

La Registrolibro de la Mondcivitanoj kontentus se ĉiu Civitano de la Mondo **jare** pagus monsumon egalan al **salajra aŭ enspeza duontago**. Komprenable pri tiu "memvola mondimposto" ĉiu mem taksas kiom li povas pagi, konsiderante siajn monrimedojn kaj la monsumojn, kiujn li krome jam pagas por la defendo de la tutmonda komunumo.

*En lando, kie ekzistas Registrocentro, ĉiu pago povas pravigi fisikan ateston*

### **Enregistriĝoj - abonoj - memvolaj kontribuoj - aĉetoj**

**Pageblaj :**

- aŭ al via Registrocentro (se ekzistas)
- aŭ al : **CITOYENS DU MONDE (RCM)**  
CCP PARIS 2848 94 Y

**IBAN** : FR 10 2004 1000 0108 8489 4Y02 027

Bank Identifier Code : PSSTFRPPPAR

- Ni akceptas la eŭrajn ĉekojn sur **francaj** bankoj.
- Por la aliaj landoj, preferendas la internacia poŝtmandato, aŭ la interbanka ĝiro inkluzivante la ĉi supran IBAN-kodon
- Ni akceptas la bankajn **monbiletojn** enŝovitajn en koloran aŭ karbonan parperon, sub koverto ne registrita.
- **Paypal** : [www.recim.org/cdm/pag-eo.htm](http://www.recim.org/cdm/pag-eo.htm)

**RECIM-info**, Imprimé par nos soins

Le numéro : 2 € (envoi compris)

Abonnement pour 5 numéros : 10 €

Tirage : 4400 exemplaires

Directeur de la Publication : Daniel Durand

**Tradukis** : Daniel Durand, Manuel Ortega

### **CIVITANOJ DE LA MONDO**

66 boulevard Vincent Auriol, FR 75013 PARIS

Sekretariejo, bulteno, kasisto :

"Les Nids", **FR 49190 ST-AUBIN** (Francio)

[www.recim.org](http://www.recim.org)

[abc@recim.org](mailto:abc@recim.org)